

Jean de Dieu Kikako: Trudo de la milito

Mi vekiĝas, striko abundas!
Mi dormas, malsato ĝenas min!
Ho, la vivo!
Ni ne plu havas manĝaĵon pro la milito.
Nia ĝojo fariĝas malĝojon.
Anstataŭ ĝui nian liberecon,
Ĝuas ni nian malliberecon!
Ho la vivo!
Seksperfortojn niaj patrinoj viktimas!
Kie ni havos ĝojon!
Pro la milito, niaj samteranoj mortas!
Ho milito!
Tago post tago estas trudaj mortigadoj.
Mortigantoj daŭre volas mortigi.
Tiuĵ, pri kiuj ni esperis, perfidas nin.
Ho milito!
Streĉas nin la milito.
Malsanoj famiĝas en niaj kapoj.
Malsekureco abundas.
Ho la vivo!
Bomboj estas la ĉiamaj vekiloj.
Perdas ni loĝejojn.
Perdas ni laborojn.
Kiu helpu nin!

Vivu la paco inter ni.

© *Publikada rajto de tiu ĉi verkaĵo validas nur por la retpaĝo de Hungaria Esperanto-Asocio. Reproduktado de la verkaĵo eblas nur per la permeso de la rajtoposedanto Jean de Dieu Kikako (la verkisto) jeandekikako@gmail.com*



Jean de Dieu Kikako: La naturo

Dormas mi silente
Spiras freŝan aeron
Promenante en herbejo,
Flarante bonan naturodoron,
Bongustante naturajn pomojn,
Produktitajn de la senvenenaj arboj.
Oh! la naturo.
Kun amikoj turismumas en vi,
Florsezone.
Ĝuante la guston de la pluveto,
Tuŝante rozkoloritan floron de la Kreinto!
Aprezu la naturon!
Protektu la naturon!
Imagas mi oferti al esperantistoj:
Verdajn florojn pac-simboligajn,
Ruĝajn florojn simboligantaj profundan amon,
Tra la naturo konatiĝis mi kun teranoj.
Marŝas laŭ via ritmo,
Via-ritme ni ĉion faras.
Marŝas ni libere sub la lunlumo,
Promenas frumatene apud rivero,
Ekvidas ni la aŭroron.
Kiun admirigas nin al vi.
Bela vi estas, la naturo!
Kia ĝojo estu el esperantistoj
Kiuĵ ĉiam volas vin protekti?
Mirinde sentas nin plonĝi rivereten.
Oh! Admiras ni vin kaj protektas vin.

© *Publikada rajto de tiu ĉi verkaĵo validas nur por la retpaĝo de Hungaria Esperanto-Asocio. Reproduktado de la verkaĵo eblas nur per la permeso de la rajtoposedanto Jean de Dieu Kikako (la verkisto) jeandekikako@gmail.com*

